

PADETO

M. Gabino Gorla Penalosa/J. De Dios Filiberto
Esperantigo: Emanuele Rovere

“Caminito”, padeto laŭ kiu promeni kutimis ni mano en man’,
nun mi venas je la lasta foj’ por rakonti pri mia malĝoj’.

“Caminito”, vi tiam parfumis de falĉitaj herboj kaj junkoj en flor’,
baldaŭ iĝos mi ombro kaj nur de vi restos paliĝanta spur’.

Depost ŝia forir’, mi vivas en dolor.’

“Caminito” amika, ankaŭ mi iros for’.

Ŝi forlasis min kaj ne revenos plu.

Mi sekvos ŝiajn paŝojn: “Caminito”, adiaŭ!

“Caminito” mi ĉiun vesperon feliĉa laŭiris vin kun amosent’:
se hazarde ŝi tie repasos, vi al ŝi, ke mi ploris ne diros.

“Caminito” la dornaj rubusoj permane de l’tempo jam nun kaŝis vin.

Volus fali mi ĉe l’via rando kaj forviŝos la temp’ ankaŭ min.

Depost ŝia forir’, mi vivas en dolor.’

“Caminito” amika, ankaŭ mi iros for’.

Ŝi forlasis min kaj ne revenos plu.

Mi sekvos ŝiajn paŝojn: “Caminito” adiaŭ!